



Go-Amiko

**Informilo de
Japana Esperantista Go-Asocio
N-ro 151, Decembro 2017**



JEGA 第38回新春囲碁大会のお知らせ

恒例の新春囲碁大会を下のように開きます。奮って参加してください。

日時：2018 年1月8日(成人の日) 10:30～16:00

場所：大崎囲碁クラブ（電話 03-3491-1349）

（JR 大崎駅下車、北改札口を出て西口へ。向かい側藤和大崎コープ4階405号室。）

会費：2000円(当日お弁当を用意します) *年会費、寄付金も受け付けます。

出欠の連絡：メール、ファックス、電話で、堀までご返事ください。

堀泰雄 371-0825 前橋市大利根町 2-13-3

メール：horizon@water.sannet.ne.jp 電話・ファックス:027-253-2524

La 38a Novjara Go-konkurso de JEGA

Ni okazigos la 38an Go-konkurson de JEGA jene :

Dato : la 8an de januaro 2018 ekde la 10 :30 ĝis la 16:00a

Loko : Go-klubo de Oosaki (tel : 03-3491-1349)

en la ĉambro 405 en la 4a etaĝo de la apartamentaro de
Toowa-Oosaki tuj antaŭ la okcidenta elirejo de la
JR-stacidomo Oosaki en Tokio

Kotizo : 2000 enoj inkluzive de lunĉo

Kiam vi partoprenos, kontaktu Hori Jasuo (horizon@water.sannet.ne.jp)

Go en la 104a Japana Esperanto-Kongreso



La 4an de novembro okazis fakkunsido de Go en la 104a Japana Esperanto-Kongreso en la urbo Jokohama. En tiu kunsido partoprenis ok homoj, el kiuj du estas komencantoj. Funde estas tiuj du virinoj: maldekstre s-ino Joŝida el Japanio kaj dekstre Elstara el

Koreio ludanta kun s-ro Mori. Pli antaŭe, de dekstre s-roj Sakurai kaj Janaĉi, s-roj Ho Song el Koreio kaj Futacugi.

Dum la kunsido mallonge okazis la Jara Kunveno, kaj ni decidis, ke same kiel en 2017, ni agados jene.

Agadplano de JEGA por 2018

1. Estraro

Reprezentanto: HORI Jasuo (s-ro) Sekretario: MORI Hitoŝi (s-ro)

Kasisto; SAKURAI Nobuo (s-ro, Honora Reprezentanto)

2. Laborplano

(1) Kunsidoj

Novjara kunsido : 2018.1.8 en la Go-salono de s-ro Sakurai

Maja kunsido : 2018.5.19-20 en Esperanto-Domo de Jacugatake

La 103a UK : en Movada Foiro kaj en salono ni gvidos ĝo-kurson.

La 105a Japana Esperanto-Kongreso: ni havos kunsidon.

(2) Eldono de Go-amiko

En aprilo, aŭgusto kaj decembro ni eldonas nian revuon.

Go-amiko aperos en nia retejo: <http://jega.shisyou.com/jega/index.html>

(3) Kotizo de JEGA

Japanaj membroj pagu 1000 enojn kiel la jaran kotizon.

Eksterlandaj abonantoj ricevos la revuon senpage.

Kvar barataj junulinoj lernis Go-n.

En oktobro okazis la 4a Sud-Azia Seminario en la urbo Bengaluro, Barato. Mi partoprenis en ĝi, kaj dume mi instruis Go-n al kvar junulinoj. Kutime dum kongresoj ni havas tre mallongan temon por instrui, sed ĉi-foje ni havis multan tempon, eble 4 horojn, kaj ili havis grandan intereson pri Go, do mi povis instrui al ili sufiĉe profunde. Mi estas certa, ke ili povos ludi mem sen helpo de lertuloj.

Dum mi instruis Go-n, mi instruis ankaŭ Esperanton. Unu el japanaj proverboj pri Go estas „Se ni tro deziras kapti ŝtonojn, male viaj ŝtonoj estos kaptitaj”, kaj mi tradukis ĝin kiel “Kaptu, kaptu, ve, estas kaptita!” kaj mi interpretis, ke kiam vi volas kapti edzon, tio estas permesata. Vi provu kapti kaj kapti, kaj vi estu kaptita!”, kaj ĉiuj ridegis kaj konsentis.

Mi donacis malgrandan tabulon kaj la libron pri Go. Mi aŭdis, ke Snehaja (Plej maldekstre en la foto) nun ludas kun sia frato, kaj legas la libron dum la 49a Internacia Sumoo (legkonkurso).



10月にインドで、第4回南アジアエスペラントセミナーが開かれた。私はこれに参加し、講義などの間に、参加していた4人の女子大学生に囲碁の手ほどきをした。世界大会などでも、囲碁の講習を行うが、時間が足りなくて、ほんのさわりだけで終わってしまい、ほとんど囲

碁への導入にならない。しかしこのセミナーの3日間では、4時間ほどの時間も取れたので、これなら後で囲碁が打てるという段階まで教えることが出来た。彼女たちも、「やる！やる！」と熱心でこの4時間は本当に楽しかった。教えるのもエスペラントでやるので、この囲碁教室は、同時にエスペラントの講習会でもあった。『取ろう、取ろうは取られの元』、でも「彼氏が相手の時には『取ろう、取ろう、あ、取られた！』で良いんだよ」というとキャツ、キャツと大騒ぎだ。« Kaptu, kaptu ! , ve ! estas Kaptita ! »は、彼女たちには、きっと一生忘れられないだろうな。

XXVI-a Esperantista KGS-Turniro (6)

{11a de aŭgusto 2017,
ja, la sekvanta turniro jam progresas sur la 5-a ciklo.}

Karaj go-amikoj,

Mi mem ne scias, kial mi nur nun tiel prokrastate sendas al Vi la finan tabelon de nia turniro!? Pardonu al mi! Kvankam mi havis tre "streĉan" someron ĝis nun: ferioj kun nia nepo en Romo, laste mi partoprenis la ĝis nun plej grandan Eŭropan Go-Kongreson en Oberhof (kie Vi estis?) - sed ne la tutaj du semajnoj (kun eŭropa ĉampioneco), nur la semajnfina turniron (sed eĉ tie partoprenis 635 ludantoj!). Vidu <http://www.egc2017.eu>! Kaj mia filino aĉetis domon renovigendan - tie mi ofte helpas nun.

Ĉi-foje ni ne havas iun kun 5 aŭ 4 gajnitaj partioj. Estas kvar de ni kun 3:2 rezulto: russ, esgo, Javaharlal kaj HegedusI - do - 4 turnirgajnantoj!

Ĉiam ne forgesu, ke niaj 3 plej fortaj partoprenantoj devis ludi partiojn kun parte alta nombro de handikapŝtonoj. Pro tio mi kiel ĉiam aranĝis kiel duan la tabelon de la "veraj" potencoj.

La fina turnirtabelon de nia XXVI-a turniro:

{3-a kolumno: grado; ek de 4-a kolumno ĝis 8-a: +gajno, -malgajno, /egala, kaj numero de kontraŭulo; 9-a: nombro de gajno}

1. Cortex	II D	-6	+4	+3	-2	-7	2
2. Morikin	II D	-4	-6	-5	+1	+3	2
3. ESPERANTO	1 K	-8	+5	-1	+4	-2	2
4. russ	4 K	+2	-1	+7	-3	+8	3
5. esgo	4 K	+7	-3	+2	-8	+6	3
6. Javaharlal	6 K	+1	+2	-8	+7	-5	3
7. dodosan	11 K	-5	/8	-4	-6	+1	1
8. HegedusI	12 K	+3	/7	+6	+5	-4	3

Kaj la tabelo de la "veraj potencoj"

(3-a kolumno: grado; 4-a kolumno: elirpoentoj laŭ grado; 5-a: gajnitaj partioj; 6-a: finrezulto)

1. Cortex	II D	21	2	23
1. Morikin	II D	21	2	23
3. ESPERANTO	1 K	19	2	21
4. russ	4 K	16	3	19
4. esgo	4 K	16	3	19
6. Javaharlal	6 K	14	3	17
7. HegedusI	12 K	8	3	11
8. dodosan	11 K	9	1	10

Mi tre kore gratulas al la plej fortaj Cortex, Morikin kaj ESPERANTO!

Mi planas la komencon de nia XXVII-a turniro por la 2017-8-27. Varbu inter viaj amikoj por ĝi!

Bedaŭre intertempe denove (la 3-a aŭ 4-a fojo en jaro 2017) malaperis ni "Esperantejo" en KGS. La algoritmo por tiu estas sekreta. Antaŭ miaj ferioj mi ĉiutage (!) ŝanĝis ion en la priskribo de la Esperantejo pro malkaŝi la tro malmultajn aktivecojn en ĝi. Sed nun dum miaj ferioj ĝi malaperis. Aŭ mi (aŭ iu alia) denove provos instali ĝin aŭ ni devus ludi en iu alia ĉambro (sen varbado por Esperanto!). Kion Vi pensas?

Mi esperas, renkonti Vin ĉiuj (!!!) fine de aŭgusto en nia nova turniro!


Via Matthias / esgo

{ Noto de redaktoro: En ludejo de KGS inter-reta go-servejo (<https://www.gokgs.com/>) oni povas fari tempan “novan ĉambron”. La partoprenantoj faradas “esperantejon” kiel unu el la tempaj novaj ĉambroj por iliaj partioj. }

Go-ekzercaro por komencantoj (15)

N.Sakurai

Kiel Nigro metu? Ne eraru. sed trovu la ĝustan meton.





Respondo A: Bona

La minaco N-1 estas bona.
Se Blanko ligas kiel B-2,
per N-3 la 8 blankaj ŝtonoj
estas kaptitaj.



Respondo B: Malbona

N-1 estas malbona.
Per B-2 la 7 nigraj ŝtonoj
estas minacitaj.



La problemo 251-a
Nigro havas meton. Ĉu la
nigraj ŝtonoj vivas? Kio
estas dirite pri simetria
formo?

La problemo 252-a
Blanko havas meton. La
blanka vivas en minimuma
spaco. Kiel?



La solvo 251-a

La nigraj ŝtonoj vivas.

Fig. 1-a. (La solvo) N-1 estas la solvo. La simetria formo havas rimedon sur ĝia akso, kio trafas. Blanko ne plu havas rimedon ataki.

Fig. 2-a. (Malsukceso) La minaco N-1 malsukcesas. Blanko respondas B-2 kaj B-4, tiam la nigra ŝtonaro havas nur unu okulon kaj mortas.




fig. 1-a.




fig. 2-a.

La solvo 252-a

La blankaj ŝtonoj vivas

Fig. 1-a. (La solvo) Oblikva meto B-1 estas ĝusta.

Fig. 2-a. (Daŭrigo) Al la rekta meto N-2, per B-3 la blankaj ŝtonoj vivas minimume.




fig. 1-a.




fig. 2-a.

Fig. 3-a. (Vario) Al la invado N-2, Blanko ne baras, sed ŝprucas kiel B-3, kaj al N-4 respondas B-5. Al N-6 per B-7 la blanka ŝtonaro vivas.

Fig. 4-a. (Vario) Ĉe N-6 de fig. 3-a, celante angulan kurban kvaron ankoraŭ internen ataki kiel N-6, al tio Blanko respondas kiel B-7, B-9. La rezulto estas ne la angula kurba kvaron sed kunvivo.




fig. 3-a.




fig. 4-a.

Fig. 5-a. (Malsukceso) Post la ŝpruco B-1 ligi oblikve kiel B-3 fariĝas alternekapto, kio estas malsukceso por Blanko.

Fig. 6-a. (Vario) Kiel do al B-1 per N-2 ataki internen celante mortigi senkondiĉe? En ĉi tiu kazo tamen post B-3, N-4 B-5 devigas respondon de ekstero, kaj pro tio ĝis B-7, la blanka ŝtonaro vivas senkondiĉe.




fig. 5-a.




fig. 6-a.

Kiel kutimon-amemaj estas homoj...

Bezonas geniulojn por revolucii, kiel

L. L. Zamenhof, 呉清源 aŭ

Alpha Go (unu el Artefaritaj Intelektaj).

MORI Hitosi

Enhavo

>Artefarita Intelektaj (A.I.) taksas staton de intelektaj ludoj, nome eblecon por venko, kiel la procento.

- Ekzemplo: Japana Go-A.I., ZEN (Zenito: 天頂の碁) taksadas la eblecon por venki.

>Revolucioj en formaciada strategio en GO-ludo

- Malnova formaciado: ekzemplo de Ŝusaku-a maniero (秀策流)

- Nova formaciado en frua Ŝouŝa erao, komencita de


GO SejGen (呉清源) kaj KITANI Minoru (木谷 實)

- Moderna formaciado

- Revolucio de Alpha Go, la plej forta A.I. en jaro 2017

>Vortoj de go-profesiuloj pri A.I.


Japana Go-A.I., ZEN (Zenito: 天頂の碁) taksadas ludo-staton.



Post la 6a ŝtonmeto, sur koordinato "D-6" la taksita ebleco por venko de Blanko multiĝis al 59%.

Tio signifas la 5a ŝtonmeto de Nigro sur koordinato "G-6" estis malbona.


Malnova formaciado: ekzemplo de Ŝuusaku-a maniero (秀策流)



Kutime, oni komencis ludojn ŝtonmetante sur punktojn 3-4, kiu nomiĝas “substelo”, japane KOMOKU (小目)

En la tradicia formaciado, oni celas fari teritoriojn unue en anguloj kaj sekve en randoj.


Nova Formaciado en frua Ŝouŭa erao, komencita de
GO SejGen (呉清源) kaj KITANI Minoru (木谷 實)



Kutime oni komencis ludojn ŝtonmetante sur punktojn 4-4, kiu nomiĝas “stelo (en angulo)”, japane HOŜI (星), aŭ sur punktojn 5-5 aŭ 3-3, kvazaŭokupante la angulon per unu ŝtonmeto.


En tiu ĉi formaciado, oni alte taksas centran kampon por aŭ fari grandan teritorion aŭ batali tie.

Moderna formaciado post la Nova Formaciado



Ludoj komenciĝas per diversaj unuaj ŝtonmetoj sur punktojn 3-4, 4-4, 3-5 aŭ 3-3 aŭ 4-5. Oni devas pli flekseble pensi kien ŝtonmeti por plej efektive fari teritorion aŭ ataki kontraŭulan ŝtonaron.

Revolucio de Alpha Go, la plej forta A.I. en jaro 2017



Laŭ kutima saĝo de Goistoj tro fruan invadon kontraŭ stelo

Alpha Go pli alte taksas la teritorion ĉirkaŭotan de ŝtono sur stelo en angulo, ol homaj Goistoj taksas.

